

ESPERANTO

★ TRIUMFANTA ★

N-o 46, 21. aug. 1921.

Jurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

★ Eliras semajne. ★

La lastaj Kongrestagoj.

Daŭrigo de nia raporto pri la XIII-a Kongreso de Esperanto el la antaŭa n-o.

Dankon al la ĉsl. samideanoj! — Adiaŭ, Praha!

Pensoj pri Internacia Eldona Societo Esperantista sur la bazo de ET.

La sesa kongrestago.

(Vendredo, 5. aŭgusto.)

Ferma kunsido de UEA. — Tria laborkunsido de la XIII-a. — Koncerto de blindaj virtuozaĵoj. — Promenado tra Praha. — Kelkaj notoj pri vivo en Praha.

En la ferma kunsido de UEA oni komence parolas pri Ruĝa Kruco, Ligo de Nacioj kaj Internacia Laboroficejo.

S-o Unger raportas pri la komercista konferenco de mardo.

Internacia Laboroficejo en Genève sendis oficialan delegiton s-on Blumel. Oni decidis sendi telegramon al la Internacia Laboroficejo dankante pro la sendo de oficiala delegito.

D-ro Privat klarigas la celojn de la Internacia Laboroficejo.

S-o Stettler skizas la intencitan novan organizon de la esperantistoj kaj proponas rezolucion, per kiu 1. la kongreso de UEA dankas al s-o Page pro la bona gvidado de la komitato por la reorganizo, kaj 2. la kongreso, aŭdinte la raporton, decidis akcepti la raporton en principo, sed deziras, ke la komitato de UEA a) plue esploru la demandojn de reorganizo kaj submetu statuton al la voĉdonado de la membroj aŭ prezentu novan raporton al la kongreso, kaj b) speciale atentu diversajn dezirojn pri celo kaj konsisto de la Ligo, pri la du oficejoj ktp. ktp.

Laŭ propono de d-ro Privat oni decidis proponi al la venonta kongreso elekti generalon Sebert kiel honoran prezidanton de la nova Ligo.

Fine d-ro Privat dankas en la nomo de la kongresanoj al s-o Stettler pro lia bona prezido kaj granda laboro.

S-o Stettler dankas la kongresanojn kaj fermas la kongreson de UEA.

Posttagmeze estis la tria laborkunsido de la Universala Kongreso.

S-ino Cense legas la protokolojn pri la du unuaj kunsidoj, kiuj estas aprobatataj.

S-o Pitlik legas salutojn, interalie telegramon de prezidanto Masaryk: Mi dankas al enlandaj kaj fremdlandaj kongresanoj pro salutoj kaj mi ripetas ilin reciproke. Mi deziras sukceson al via celado servanta al progresema idealo de internacia organizo.

D-ro Fridrich legas rezolucion de faka kongreso de malgrand-naĉianoj.

Prof. d-ro Stejskal parolas pri „Esperanta Ligilo“ kaj proponas fondi internacian helpon por financigo de „Esperanta Ligilo“ tiamaniere, ke ĉiu esperantisto pagante sian kotizaĵon al grupo aŭ sian abonon al gazeto krompagu kelkajn helerojn, pŝenigojn, centimojn ktp. Plue li petas, ke vidantoj transkribu librojn, precipe lernolibrojn, en Braille'an skribon.

Laŭ propono de s-o Pitlik oni fondas komisionon por la organizo de la afero: prez. d-ro Cart, kas. d-ro Stejskal, sekr. prof. Macan kaj du aliaj, kies nomojn mi ne komprenis.

Eniras s-o Blumel kaj salutas la kongreson francilingve en la nomo de Internacia Laboroficejo. Li bedaŭras, ke li ne povis veni pli frue, kaj miras pri la facileco de la interkompreniĝo.

La kongreso tre aplaŭdas lin.

Pri propono de s-o Ziegler (kiu ne ĉeestas) koncerne fondon de naciaj eldonaj societoj esperantaj por eldoni librojn kaj gazetojn en Esperanto Kongreso esprimas la opinion, ke tio estas privata afero.

La redaktoro de „Esperanta Finnlando“ s-o Setälä faras interesan raporton pri la nuna stato de la esp. gazetaro, pri kiu estiĝas vigla debato. Parolas por aŭ kontraŭ s-oj Sevenhuysen, Grenkamp, Ketterling, Warden, Privat, Kamaryt kaj s-ino Cense.

Fine estas akceptata rezolucio de s-o Stettler, laŭ kiu la XIII-a Kongreso de Esperanto konstatas, ke la multeco de esp. gazetoj ne estas nepre signo de saneco en nia movado, kaj rekomendas al la fondontoj de novaj gazetoj zorge esplori, ĉu la intencata eldonado vere respondas al bezono.

Sajnas, ke la fondo de du dusemajnaj (?) gazetoj, kies unuaj numeroj aperis je la kongreso, en formato simila al ET, jam „ne estas nepre signo de saneco en nia movado“ kaj ne „respondas al bezono“. Ni supozas, ke post duona jaro ambaŭ gazetoj ree malaperos pro manko de abonantoj, kiam la mono, kiun iliaj eldonantoj disponigis por ilia propagando, estos elspezita.

La internacian koncerton de la blindaj virtuozaĵoj kaj kantistoj en salono sur insulo Zofin mi ne partoprenis; sed ĉeestintoj diris al mi, ke ĝi sukcesis bonege, kaj ke mi malhavis grandan ĝuon.

Sed mia spirito estis hodiaŭ vere tro laca por povi koncepti je sufiĉa kompreno la belegajojn de la muziko. Mi decidis fari vagadon tra la stratoj kaj stratetoj de la malnovaj kvartaloj, tute senplane, kien min kondukos la hazardo.

Jen mi staras sur la ponto de Karlo. Miaj rigardoj iras de la trankvile fluantaj akvoj de rivero Vltava, en kiuj respeguliĝas la lastaj radioj de la vespersuno, al la transa bordo. Tie kuŝas „Hradčany“, la kastelego, vasta komplekso de palacoj kaj domoj, el kiuj superstaras la katedralo de Sankta Vito, etendanta sian ĉefan turon alte en la ĉielon tute ruĝan pro la brilo de la ĵus kuŝiĝanta suno. Grandioza estas la aspekto, admirinda. Malfacile estas deturni la rigardon de tia bildo el „Mil kaj Unu Nokto“.

Poste mi retrovas min en niĉo de la malluma strateto, kontraŭ belega pordego de antikva preĝejo. Ĉio en plena silento. Vespere ŝvebis mallaŭte de supre kaj kovras ĉion per sia milda ombro.

Mi vagas plue. El iu heligita fenestro sonas tremanta melodio de violono, vibras kanto de dolĉa alda voĉo.

Kaj plue. Tra iu porda vojeto. Flustrado dekstre kaj maldekstre. Varmegaj vortoj, ardaĵ kisoj. Jen regas amo kaj sopiro.

Alla bildo: pordo de „kavarna“ (restoracio), interne laŭta babilado, ĝojkrioj, viroj.

Kaj nun mi transversas unu el la larĝaj ĉefstratoj, kie pulsas la vespera vivo de grandurbo, kie venadas kaj iradas la homoj, la aŭtomobiloj, la elektraj tramoj, — kie la hela brilo de grandaj arklampoj forpelas la noktan mallumon. Mi admiras la belulinojn de Praha, ilian ĉarmon, ilian „chic“ de grandurbaninoj. Preskaŭ ĉiuj estas iel belaj, nur iom diketaĵ ili ŝajnas por mia gusto.

Sed eĉ ili ne povas min haltigi longtempe. Mi daŭrigas mian solecan vagadon por esplori pli funde la vesperan intimecon de la stratetoj de Praha.

Kaj fine mi estas satigita. Preskaŭ ĉiun strateton mi travagis. Entute mia promenado daŭris tri horojn. Multan interesan mi vidis, neforges-eblajn impresojn mi portis hejmen el la mallumaj stratetoj de la malnovaj kvartaloj. Kaj en la nokto mi sonĝis pri ili, partoprenis mem en la intima vivo de Praha'anoj.

Cetere, mi havis bonegan loĝejon en kvartalo Vinohrady (Vinmontoj), same kiel mia fratino. Aliaj samideanoj plendis pri iaj malagrablaj bestetoj en sia lito; nin ne ĝenis tiaj. Kaj nia mastrino — maljuna fraŭlino — estis tre kompleza, alportis al ni ĉiumatene bonan membakitan papavokukon kaj parolis eĉ germane kun ni.

Je tiu ĉi okazo mi volas ankaŭ rakonti pri iu moro, kiun mi ĝis tiam ne konis. Oni ne ricevas domŝlosilon en la domoj de Praha; sed ĉiufoje, kiam oni revenas hejmen post la 10-a vespere, oni devas sonorigi al la dommastrino, kiu malŝlosas kaj ricevas po persono unu kronon. Do,

mi devis pagi ĉiuvespere unu kronon por mi resp. du kronojn, se mia fratino estis kun mi; ĉar kongresanoj kutimas veni hejmen nur je malfrua horo.

Ankaŭ la veturado en elektra tramo estas sufiĉe kosta dum la vesperaj horoj. Ĝis la 9-a horo oni pagas nur 1,20 kr.; por krom oni rajtas traveturi la tutan urbon, ankaŭ ŝanĝi vagonaron; sed post la 9-a oni pagas 2 kr. kaj post 10.30 h. eĉ 4 kr. po persono. La elektraj tramoj en Praha veturas cetere tiel rapide, kiel mi ĝis nun ne ofte spertis.

La lasta kongrestago.

(Sabato, 6. aŭgusto.)

Ferma kunsido de la XIII-a. — Elekto de la urbo de la XIV-a: Helsinki estas unuanime akceptata. — Danko al la ĉsl. samideanoj. — Adiaŭ de Praha.

La ferma kunsido estas eksterordinare bone vizitata.

Salutas la kongreson en esperanta lingvo la oficiala delegito de la Ruĝa Kruco en Genève, s-o Rodolphe Horner, parolante pri la agado de Ruĝa Kruco en Ĉeĥoslovakio sub gvidado de f-ino Masarykova, filino de l' prezidanto.

D-ro Kamaryt dankas al li en la nomo de l' kongreso.

D-ro Krousil legas rezolucion de la Societo de ĉsl. Inĝenieroj kaj Arkitektoj favoran al Esperanto.

S-o Balkanyi diras, ke ne estas bone, ke ne-scienca esp. gazeto enpresas kritikojn je la Krestomatia k. s., ĉar tio povas konfuzi novajn adeptojn; plue li deziras, ke komercistoj ne malbonuzu la nomojn „Zamenhof“ kaj „Esperanto“ por siaj komercaĵoj.

S-o Pitlik sciigas la laste alvenintajn salutotelegramojn, de s-o Nylén en Stockholm, de esperantistoj el Lwow k. a.

Prof. d-ro Cart legas raporton de la L. K. kaj la nomaron de tiuj personoj, kiuj kunlaboras en la sekcio de d-ro Corret.

S-ino Cense legas rezolucion de esp. studentaro.

S-o Laquer parolas pri la Postkongreso en Budapeŝt, donas informojn kaj invitas la gesamsideanojn multnombre viziti la belan ĉefurbon de Hungarlando.

S-o v. Medem donas konsillojn pri la prononcado.

(Efektive, ankaŭ mi rimarkis, ke eĉ spertaj esperantistoj intermiksadas nominativon kaj akuzativon; kelkaj konstante uzas malĝuste la pasivan partecipon de estinteco anstataŭ tiu de estanteco.)

Sekvas la diskuto pri la loko de la venonta kongreso.

D-ro Kamaryt informas, ke sole la urbo Wiesbaden en Germanio sendis oficialan inviton.

D-ro Setälä konsilas, ke oni parolu antaŭe pri la ĝeneralaj principoj en lando, kie okazu kongreso.

S-o v. Frenckell elparolas valorajn pensojn pri la necesaj kvalitoj de la kongresa lando kaj urbo.

S-o Stettler diras, ke Wiesbaden ne estas konsilinda kaj proponas urbon en Finnlando.

S-o Setälä klarigas, ke la finnoj intencis inviti nur la XV-an; sed se la kongreso decidis, ke jam la XIV-a okazu en Helsinki, ili volonte konsentas. Li atentigas, ke la venonta jaro estos jubilea jaro de la 35-jara ekzistado de Esperanto.

Liaj paroloj trovas multvoĉan eĥon ĉe la kunsidanaro.

S-o Warden subtenas la proponon. Li diras, ke por vidi soldatojn, li ne bezonas iri al Wiesbaden (okupita teritorio), ke tiajn li povas sufiĉe vidi en sia propra lando.

Ankaŭ s-o Pitlik diras, ke „li subtenas la proponon de s-o — Helsinki“. (Ridado kaj aplaŭdo.)

Recenzejo.

LIBROJ.

BILDOTABULOJ por la instruado de Esperanto. De Thora Goldschmidt, prilaborita de prof. d-ro Joh. Dietterle. Dua korektita eldono. Leipzig 1921. Eldonejo Ferdinand Hirt & Sohn 96:21 cm 104 pĝ. bind. Prezo 15 mk.

La rapida elcerpiĝo de la unua eldono estas la plej bona pruvo por la taŭgeco de la supre nomita verko. Efektive, kiu deziras rapide ellerni konversacion en Esperanto pri ĉiuj ajn aferoj de la ĉiutaga vivo, povas tion plej efike laŭ la Bildotabuloj de Thora Goldschmidt.

Jen ni alvenas en la "stacidomo, promenon tra la urbo, loĝas en hotelo, vizitas poŝtelon, preĝejon, teatron, muzeon, aĉetas fruktojn kaj legomon sur foirejo, vidas la fajrobregadon estinganta brulon, ktp. Ni veturas en aŭtomobilo, aviadilo, ŝipo ktp. Ni iras en domon kaj en ĝiajn diversajn ĉambrojn. Ni rigardas la partojn de nia korpo, virinan kaj viran vestarojn; la laboron de 36 diversaj metlistoj. Eĉ tombejon ni vizitas. Poste ni faras ekokurojn al farmobieno, en ĝardenon, en bird-ejon, bestojn kaj fiŝojn, fine en arbaron.

Mallonge, preskaŭ neniu flanko de la ĉiutaga vivo estas malatentata. Sub ĉiu bildo staras la bezonataj vortoj kaj apude estas multaj tekstoj: dialogoj, demandoj, artikoloj. Al la verko aldonita estas la fundamenta gramatiko, tabeloj, la ekzercaro de d-ro Zamenhof, poemoj ktp.

Por la boneco de la stilo garantias la nomo de la esp. prilaborinto, d-ro Dietterle.

La dua eldono nur malmulte diferencas de la unua. Unu salutinda bildo estas nove envicigita: la kontoro. Do la dua eldono estas ankoraŭ pli rekomendinda ol la unua. Pro tio, ke la tuta teksto de la libro estas nur en Esperanto, ĝi estas same bone uzebila por ĉiuj landoj. Do resume: nepre rekomendinda libro. (R-ano.)

GAZETOJ.

ESPERANTA FINNLANDO. Julio.
Ilustr. artikolo pri insulo Suursaari (inter Finnlando kaj Estonio). Raporto pri la ekkurso de finnaj s-anoj al Tallin (Reval, ĉefurbo de Estonio).

ESPERANTISTA LABORISTO. Julio-aŭg.
Porkongresa numero eldonita en 2800 ekzempleroj, ilustrita, presita sur bona papero, 16-paĝa, kun interesa enhavo. Adreso: 177, Rue de Bagnolet, Paris.

ESPERANTO. Julio-aŭg.
„Al Praha Kongreso kun ĝoja koro!“ elvokas s-ano Privat, kaj prave; ĉar la nombro de la partoprenantoj (2800 aŭ pli) oble superis niajn plej optimistojn esperojn.

GERMANA ESPERANTISTO. Julio.
Enhavas telegrafan scigon, ke „komerca universitato Nürnberg estas konkerita“ por Esperanto. Krom tio la alia bona enhavo.

INTERNACIA KOMERCA REVUO. Junio.
Artikoloj pri la svedaj foiroj, pri Latvio, pri Internacia Federacio por Komercia Lingvo.

LE MONDE ESPERANTISTE. Majo-junio.
En franca lingvo kaj en Esperanto.

NOVA TEMPO. Junio-julio.
Kelkaj interesaj artikoloj, interalie rakonto de kapitano Sinner pri siaj spertoj per Esperanto en orienta Siberio.

Abonoj al ET.

Ni liveras al ne-germanaj landoj: 52 n-ojn (tuta jaro) por 100 germ. mk., 10 ŝil., 10 sv. ŝk., 20 fr. ŝk., 5 hol. guld., 10 ekand. kr., 2 dolaroj aŭ 25 ilroj (ilrojn ni akceptas nur el Italio); 26 n-ojn (duona jaro) por duona prezo. Al Balkano kaj Balkano ni liveras 26 n-ojn por 25 germ. mk., al Polio 200 pmk., al Finnlando 25 fmk., al Aŭstrio 125 kr., al Hungario 75 kr., al Ĉeĥoslovakio 55 kr.

Oni pagu per monbiletoj aŭ bankĉekoj, sed ne per poŝtavizoj, ĉar la poŝto donas parte nur 2/3 de la kurza valoro.

La abonoj povas esti komencataj per iu ajn numero.

Germanoj abonu ĉe la poŝto (poŝta gazellisto, komplementoj 5 kaj 9); kvaronjare 15 mk.

Anoncoj

koostas po kvadracentimetro 1 germ. mk.; ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj rabato ĝis 40% (por abonantoj kaj esp. firmoj kromrabato de 20%).

Anoncetoj

koostas por 1-2foja enpresado kaj po 25 vortoj la prezon de 5 n-oj de ET aŭ 5 germ. mk. aŭ 5 resp.-kup. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la monon de la abonkonto (5 n-oj). Por 3-foja enpresado ni kalkulas la duoblon. Familiaj anoncetoj (naŝiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto) estas senpagaj.

Anoncetoj pri korespondo kaj intersanĝo koostas por 1-2foja enpresado kaj po 15 vortoj la prezon de 5 n-oj de ET aŭ 5 germ. mk. aŭ 5 resp.-kup. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la monon de la abonkonto (5 n-oj). Por 3-foja enpresado ni kalkulas la duoblon.

Germanoj povas pagi monon al nia poŝtĉekkonto: Kŭln 70865 por Teo lung, Horrem.

Anoncetoj.

KIU SAMIDEANO povus prizorgi al mi okupadon en fremdlando? Mi finis antaŭ 11 jaroj komercan akademion, havas de tiu tempo bank- kaj fabrikspraktikon (el tio 4 larojn en Ruusio), parolas boheme, esperante, germane, ruse, parte anglie kaj pole. Afabliaj proponoj je adreso: Vilém Černý, bankoficisto, Trebechovice, ĉe Hradec Kralové, Ĉeĥoslovakujo.

Korespondo kaj intersanĝo.

S-o W Kaminaki, Bydgoszcz (Polujo), Bocianowo 24, deziras intersanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn ilustr. bildi.

Dankante al ĉiuj miaj gekorespondantoj mi sciligas ilin, ke pro la tro altaj poŝt-pezoj (k. 12 pmk., l. 20 pmk.) mi bedaŭrinde ne povas plu korespondi. S-o G. Tichocki, Bydgoszcz (Polujo), Zokletka 8 c II.

Tradukojn (prefereble mallongajn) el la plej famaj naciaj poetoj kaj verkistoj intersanĝas kun ĉiuj krom Anglujo, Ameriko, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Portugalujo Luisi Pappo, Via del Bragone 1-3, Genova, Sturla, Italio.

Triesto (Italujo). S-o Camuffo Armando, placo G. B. Vico 9/II, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustr. kun gejunuloj.

S-o Josef Bierbauer, Sinabelkirchen ap. Gleisdorf, Stirio (Aŭstrio), deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj, precipe kun komercistoj.

Korespondon per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj kun gesamideanoj el ĉiuj landoj deziras s-o Lois Bauer, oficisto, Ichendorf Bez. Köln, (Germ.), Glashütte.

Oswin Wisse, Hagen i. W., Böhmerstr. 45, deziras korespondi kaj intersanĝi poŝtkartojn ilustr., poŝtmarkojn ktp. kun samideanoj en la tuta mondo.

Fritz Thiel, Swinemünde (Germ.), Seest. 2, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj intersanĝi poŝtmarkojn.

Kiu sendos al mi 30-50 nesamajn poŝtmarkojn de sia lando, ricevos same tiom de germanaj poŝtmarkoj. Hermann Weiser, instruisto, Menzelen-West, Rejnlando, Germ.

7a Internacia Foiro de Breslau

Aŭtuna Foiro :: 4-a ĝis 8-a de Septembro 1921.

Teksaĵoj, ledajoj, ŝuoj, ornamaĵoj kaj artmetiaj objektoj, meblaro, pormastrumad-artikloj, sportbezonaĵaro, papero kaj paperaĵoj, kontor-uzajaro, manĝaĵoj kaj ĝuaĵoj, kemiaj teknikaj artikloj.

Informojn donas:

Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.

ESPERANTO-FAKO

BRESLAU I (Germ.), Ohlauerstr. 87.

SILKAJ BRODAĴOJ

REKTE EL ĤINUJO,
. LA SILKOLANDO!

Esperanto-brodaĵo kun surskriboj esperantaj, verda stelo, globo ktp.

Bibliaj brodaĵoj kun sanktaj tekstoj.

15 : 20 aŭ 29 : 39 cm * dol. 2.50 aŭ 4.50.

Brodaĵoj de birdoj, floroj, vidaĵoj ktp. samformataj kaj samprezaj.

Specialaj laboroj laŭ modelo.

Sendo per rekomendita letero.

Dol. 1.00 = 10 stamp. respond.-kup. aŭ 3 ŝilingoj, poŝtmandatoj aŭ kambioj de Thos. Cook & Son.

Specimeno kontraŭ 1 resp.-kup.

C. S. Gee,

HAI-YEN (tra Shanghai), Ĥinujo.

Korespondado en Esperanto!

Hungara Ĝenerala Kreditbanko Budapest

La plej granda hungara banko kun interrilatoj en ĉiuj landoj.

Akcia kapitalo kaj rezervofondoj: hung. kr. 9000000.

Kvln filioj en Budapest.

Filioj en: Brasso, Debreczen, Fiume, Győr, Kassa, Kecskemet, Nagyvarad, Pecs, Pozsony, Satoraljaujhely, Szabadka, Temesvar.

EN- KAJ EKSTERLANDAJ MINERALOJ

unuopaj pecoj kaj kolektajoj, krudaj kaj facetitaj brilantoj estas prezinde liverataj de

Magazeno de mineraloj

A. Jahn, Plauen i. V. (Germ.)
Ob. Graben 9.

Eksterlandaj liverantoj serĉataj.

Kontorartikloj ĉiuspecaj

paperaĵoj, stampiloj, stampil-kusenoj, emajl-elpendaĵoj (ŝildoj) ĉiuspecaj.

Liverado de libroj germanaj kaj esperantaj.

Reala servado. ★ Malkaraj prezoj.

Seriozaj reprezentantoj serĉataj.

Specimenoj sendotaj kontraŭ resp.-kup., plipagon mi repagos.

Rob. Pfennigwerth, Hirschfelde (Saksujo).

Poŝtĉekkonto Dresden n-o 4761. — Bankkonto Loebauerbank Hirschfelde (Saks.).

La lastaj tagoj de D-ro Zamenhof kaj la funebra ceremonio.

Valora memoraĵo por ĉiu esperantisto.

Presita sur arta papero.

Kun 11 ilustraĵoj laŭ originalaj fotografiaĵoj.

(Funebra procesio sur strato Teatralna. — Sur la Tombejo. — Enterigo de la ĉerko.

— Paroladoj de la predikanto d-ro Poznanski, de s-ano Grabowski kaj de majoro Neubarth. — La tombo, novaj fotoj de aprilo 1921.)

Prezo de la verketo 15 germ. mk.

Eldonejo de „Esperanto Triumfonta“, Köln-Horrem.

Sciencaj libroj en Esperanto:

D-ro Vöröss: Geometrio absoluta.

Tri grandaj volumoj po 22 germ. mk.

Paulo Balkanyi, Budapest VI, Hung.,
Hajos u. 15-II-2.

Helpu al la Blinduloj!

Esperanto-Verlag Berlin S 59

Friedrich Ellersiek --- Wissmann-Str. 46 (Germanujo).

Esperanto-eldonejo kaj libro-eksportejo liveras ĉiujn haveblajn librojn el Germanujo, eldonas Esperantajn verkojn kaj la gazeton

„Esperanto-Praktiko“

ĉiumonata organo por perfektigo en Esperanto.

Esperanto-Katalogo senpage, specimena numero de la gazeto kontraŭ 1 respondkupono aŭ 1 Mk. germ.

Specialaj katalogoj pri germanaj libroj laŭ deziro.